

Jacques Brel, fama franclingva poeto kaj kantisto, ankaŭ nun en Esperanto

Prezento de FaMo, kantisto, kantoverkisto kaj akordionisto

Fa kaj Mo estas la unuaj silaboj de miaj persona kaj familia nomoj. Mi estis edukita en porblindula lernejo, kie ĉiuj infanoj eklernis muzikon ekde la 6a jaraĝo. Mia unua profesio estis muzikinstruisto. Samtempe mi estis muzikisto en bandoj por -----dancvesperoj. Poste mi ekverkis miajn kantojn franclingve kaj samepoke lernis Esperanton. Mi tiam aniĝis en La Kompanoj, kantteatra trupo E-ista. Inter aliaj spektakloj ni prezentis fine de la 90aj jaroj kreaĵon pri kantoj de Georges Brassens, tre fama franca kantisto kaj poeto. Mi ofte kantis ankaŭ en maristaj kafejoj de franca insulo. Tie la publiko ju pli ŝatis kunkanti franclingve humor mar- am- - kaj ceterajn kantojn de Brassens, Jacques Brel kaj aliaj, des pli ke mi akompanas min per akordiono, tre populara muzikilo en Francujo.

Brel en Esperanto

Jacques Brel kaj Georges Brassens vivis kaj kantis samtempe, kaj havis similajn publikojn. En 2015, la organizantoj de la 100a UK akceptis la proponon de La Kompanoj por la nacia vespero: t.e. spektaklo titolita "Brel inter la gigantoj". Lillo situas norde de Francujo, najbare al Belgujo, kie Jacques Brel naskiĝis kaj kreskis. Meze de tiu spektaklo mi havis la privilegion kanti antaŭ 2500 E-istoj unuafoje 5 Brel-kantojn en E-o. Post tio, kun Pjer kaj Bernard, du aliaj Kompanoj (traduko de franca vorto "copains" kiu signifas pli malpli bonaj amikoj), ni decidis pli ampleksigi nian E-lingvan Brel-repertuaron. Ni prezentis en 2016 unuan tutan Brel-spektaklon en E-o. La artista duopo Kompanio Double Unu, konsentis helpi nin produkti la KDon Brel en Esperanto, sonregistrata en sia muzikstudio dum novembro kaj decembro en 2017. Vinilkosmo distribuos la muzikalbumon ankaŭ en diĝitaj formatoj.

Iom pri la vivo de Jacques Brel

Por mi, Jacques Brel estas modelo. Modelo estis lia kvalita kantoverkado, modela estis li kiel surscena artisto kiu vibrigis sian tutan publikon per siaj perfekto kaj potenca energio, modela estis lia profesia postulemo, modela estis lia talento, modelaj estis lia homaremo kaj donemo. Li naskiĝis en 1929, en belga burĝa familio. Juna li laboris en la familia kartonfabriko, ekkomencante verki kaj kanti siajn kantojn, sin akompanante per gitaro. En 1953 li translokiĝis al Parizo kun la celo renkonti profesiulojn de la kantadomedio. Post malfacila komenco, lia sukceso iom post iom kreskas. De 1957 ĝis 1966 li estas je la supraĵo de sia famo, koncertante ĝis po 300 fojoj jare, ĉefe en Eŭropo, sed ankaŭ sur aliaj kontinentoj, ĝis la fama usona spektaklejo Carnegie Hall. En 1966, je la apogeo de sia sukceso, li mem decidas haltigi sian karieron kaj adiaŭas sian publikon. Poste li verkos kaj registros kelkajn kromajn kantojn, adaptos usonan muzikan teatraĵon pri la vivo de Donkiŝoto "The Man of the Mancha", aktoros, produktos kaj reĝisoros 2 kinfilmojn,. En 1974 li studos maran navigadon, aĉetos velŝipon, kaj vojaĝos ĝis insuleto meze de pasifika oceano, kie li vivos ĝis 1978.

Pri kantoj de Brel

Brel verkis pli ol 200 kantojn inter kiuj pluraj dekoj estas daŭre konataj de plej multo el la francparolantoj kaj plukantataj de diversaj nunaj artistoj. Liaj tekstoj estas verkitaj en altnivela franca lingvo, kritikantaj la hipokritecon de lia epoko (ĉi Ular', La Flandrinoj), amuziĝantaj pri diverstipaj samtempanoj (La Bombonoj, Varsovi, Ek sekvant'), poete priskribantaj lian

Belgijon, (La Plata Land') aŭ la maljunecon (La Olduloj), valorigantaj universalan amon (Kiam Restas Am' Nur). Du el liaj plej mondfamaj kantoj estas verŝajne Ne Forlasu Min (Ne me quitte pas) kantita franclingve de Nina Simone aŭ anglalingve de Madonna inter aliuloj, kaj Amsterdam kantita de David Bowie. En 2018, jaro kiam okazos la 40a datreveno de la forpaso de Jacques Brel, aperos la 1a KD E-lingva kun ankaŭ kantoj el liaj unuaj verkojaroj (Sur la placo, La Diablo, Rigardu nepre ni), entute 13 kantoj.

Kiel helpi la projekton :

- Antaŭaĉetante la albumon laŭ jenaj prezoj :
po 15€ de 1 ĝis 4 ekzempleroj, po 13€ de 5 ĝis 9, po 11€ ekde 10,
+ eventualaj sendokostoj.
- Monhelpante la projekton : vi povas aldoni al via mendo etan financon donacon.
Kontraŭ almenaŭ 300€-a helpo la logo aŭ la nomo de la monhelpanto aperos sur la K.D.

Antaŭmendilo, pagmanieroj, reklamfilmeto kaj pliaj informoj troveblas sur la retejo
<http://www.doubleun.com>